

J E N - - - - - Organo de la Junularo Esperantista - - - - -
B U L T E N O de Nord-Ameriko - Marto/Aprilo, 1966
- - - - -

Redaktoro (Marto/Aprilo) Humphrey Tonkin
Vicedaktoro " Julie Crandall
Ekspedantoj Fred kaj Pat Shell

JEN-ESTRARO

Pat Shell Sekretariino.
Stanley F. Cohen Kasisto
Humphrey Tonkin Komisiito, Eksterlandaj Aferoj
Judy Lapenas Komisiitino, Ĝeneralaj Aferoj
Jim Craighead Komisiito, Varbado kaj Biblioteko
Ann Bodine Komisiitino, Ĝeneralaj Aferoj

***Materialon por la Bulteno sendu al:

(Por la majo/junia numero Humphrey Tonkin, 7 Linnaean St.
materialo devas atingi Cambridge, Mass. 02138
Humphrey antaŭ 15 Majo)

***Kotizojn sendu al:

Stanley Cohen, 16 Long Ave.
Allston, Mass. 02134

***Ĝeneralajn komunikaĵojn sendu al: Pat Shell, 2235 Parker
Berkeley, Calif.

La jarkotizo de JEN estas \$2. Kun membreco de UEA en la
kategorioj JMA (personoj ĝis 21-jaraj) kaj MAK (21-25-jaraj) la
kotizoj estas respektive \$5.20 kaj \$6.60.

MAK kaj JMA de UEA ricevas

- la kvaronjaran junularan revuon, KONTAKTO
- la monatan revuon de UEA, ESPERANTO
- la dupartan Jarlibron de UEA, kun statistiko,
adresaroj kaj ĉiuj informoj pri la Esperanto-movado
- rabatojn ĉe kongresoj, kaj aliajn avantaĝojn.

ĈU VERE EKZISTAS ESPERANTISTAJ BIGOTOJ?

Post la deklaro, fare de eminenta brita esperantistino antaŭ kelkaj jaroj, ke estas tiom da negroj en Britujo ke apenaŭ eblas trovi veran briton, ni ne tiel surpriziĝis kiam atingis la redakcion artikolo de alia brita esperantisto, W. L. Simpkins, pri "Kutimoj en Multaj Landoj." La artikolo aperis en la maja-junia numero de la konata Esperanto-gazeto Oomoto, kiun eldonas tre respektinda religia organizo en Japanio. Ĉu eble la redaktoro dormetis kaj forgesis tralegi la artikolon de s-ro Simpkins - homo parenteze bone konata inter la esperantistaro kiel mondvojaĝanto? Jen, ekzemple, la parto de lia artikolo pri Afriko:

AFRIKO: Vera paradizo por la negroj ĉar ili rajtas havi kelkajn edzinojn, sed ili devas aĉeti ilin kontraŭ bovinoj. Do, ili laboras en or-minejoj, kie ili estas bone zorgataj eĉ ricevante bieron. Post naŭ monatoj ili estas sufiĉe riĉaj por aĉeti kelkajn bovinojn laŭ la prezo de la elektita fraŭlino. Poste, kun la aĉetita edzino la negro loĝas en memkonstruita ronda dometo. La planko estas farita el la sterko de la bovinoj kaj ĝi aspektas polurita kaj estas sen odoro.

La edzo estas feliĉa, ĉar nun la edzino faras ĉion labore por li. Li nur faras bieron el plantoj. Kaj kiam li sentas ke li bezonas duan, aŭ trian edzinon li denove laboras en la or-minejoj. La unua edzino estas tre kontenta havi amikinon en apuda ronda dometo.

Por la Eŭropanoj Sud-Afriko estas paradizo. Somere en la okcidento kaj vintre en la oriento, oni povas ĝui la varman sunon dum la tuta jaro. Negroj estas tre kontentaj labori por la blankuloj, kaj ĉi tiuj hejme havas kontentajn negrajn servistojn.

Nu, ni ne tute perdis nian kapablon ridi, sed se s-ro Simpkins ŝercas, li devas tion fari malpli britece (t.e. ironie). Ni timas ke s-ro Simpkins, malgraŭ sia multa vojaĝado, tute simple havas nenian komprenon pri mondaj problemoj, kredas ke la blankuloj estas nature superioraj kaj frontas la negrojn per supereca nubskrapanta nazo. La redakcio de Oomoto kutime montras pli da respondeco.

Sed la artikolo fakte indikas pli grandan problemon. La meza esperantisto vere ne sin ĝenas pri mondaĵaj problemoj. Ĉiu ajn homo kiu legis Esperanto-gazeton tion rimarkis. La situacio estas nun centprocente pli bona ol ĝi estis: Heroldo de Esperanto, kiu estas nun redaktata en Belgujo, jam dum tri-kvar jaroj aperigadis artikolojn pri la laboro de Unuiĝintaj Nacioj kaj similaj temoj; Revuo Esperanto nun relative ofte enhavas artikolojn pri problemoj de evoluigo en ekstereŭropaj landoj; kaj la junlara revuo Kontakto, nun tri jarojn aĝa, estas komplete dediĉita al neesperantistaj aferoj.

Se ni volas ke Esperanto prosperu, ni konsciu pri la ekstera mondo. La gejunuloj ludas elstaran rolon en la nuntempa malfermado de la Esperanto-movado al la influo de la mondo.

#

USONA MIKSAĴO: NOVAĴOJ ENLANDAJ

"Esperanto Creek" en Alasko

Se Alasko ne jam havas Zamenhof-straton aŭ Esperanto-vojon, ĝi ja havas Esperanto-golfeton! Laŭ nia leganto Walter Gnagy (Juneau, Alasko), Esperanto Creek enfluas Madison Creek, kiu estas enfluanto de Tolstoi Creek, kiu estas enfluanto de Dishna River, kiu estas enfluanto de Annok River, kiu estas enfluanto de Yukon River. "Superfluas" diri ke Esperanto Creek estas tute malgranda. Ĝi troviĝas apud Monto Hurst, je proksimume latitudo 63n. kaj longitudo 157 okc.

Pool por Chicago, Tonkin por Pensilvanio

Laŭ niaj plej lastaj informoj, plej verŝajne eksestrarano Jonathan Pool estos denove en Usono ek de septembro. Li ekstudos politikan scienccon en la Universitato de Chicago. Nuntempe li estas ano de la Packorpuso kaj instruas en Istanbul, Turkio. Estrarano Humphrey Tonkin akceptis postenon ĉe la Universitato de Pensilvanio (Philadelphia kie li laboros kiel Asistanta Profesoro pri angla literaturo.

Novembra-decembra numero trafas ĉeftitolojn

La ĵurnalo Sunday Call-Chronicle (Allentown, Pennsylvania) de 16 januaro enhavis longan raporton pri la agado de la Kolegio Muhlenberg rilate la redakton de la novembra-decembra JEN-Bulteno. La

artikolo listigis la enhavon de la bulteno, menciis tiujn personojn kiuj kunlaboras en ĝia aperigo kaj priskribis la aktivecojn de la 14-membra Esperanto-klubo en la kolegio. Gratulojn al Muhlenberg!

Kollin Pri traktas Tertremojn

Iama sekretario de JEN, Dick Kollin, ĵus diplomiĝis kiel magistro de Columbia-universitato, kaj elektiĝis faka direktoro de esplorentrepreno pri tertremoj, kunlaboranta unuo de la Internacia Geofizika Jaro. La sidejo de la entrepreno situas apud Novjorko.

Se via klubo havas interesajn novaĵojn aŭ se vi persone faris ion raportindan, nepre sendu raporton al la redakcio! Antaŭdankon!

#

KOMUNA FOTOGRAFAĴO

Roman Dobrzynski

Kiel kutime la kongreso estis finiĝonta per komuna fotografado. Kolektiĝis la kongresanoj. La sinjorinoj kombis sin, la sinjoroj reliefigis brustojn, entiris ventrojn kaj ĉiuj kun la mienoj anĝele optimismaj daŭris kelkan tempon.

Venis fotografisto, la loka samideano. Li enmetis la kapon en la fotilmanikon kaj subite anoncis, ke li ne fotografos tiel grandan homamason, ĉar li kunprenis erare la familian fotoaparaton anstataŭ la pli granda, kiu restis hejme, dek minutojn pertrame.

Kiel oni scias, familia fotoaparato havas objektivon je 12 personoj, eventuale 13 maldikaj, kaj je nek unu pli. Ĉiuj do ne povis esti fotografitaj pro "objektivaj" kaŭzoj. Helpvenis tamen la demokrataj principoj, kiujn ni ja ĉiam fidele respektas. Ni solvis la problemon salomone: en la sekreta voĉdonado estis elektitaj 13 eminentuloj ŝarĝitaj per honora devo reprezenti la kongresan popolon sur la komuna fotografaĵo. Tiamaniere ni estis fotografotaj--oni povus diri--parlamentmetode.

La 13 deputitoj, bedaŭrinde ĉiuj dikuloj, jam estis viciĝantaj antaŭ la fotoaparato. Ni ne povis kaŝi kontenton, ĉar nia reprezentanto, sinjoro H.S., okupis centran pozicion. Tamen ne longe ni ĝojis, ĉar unu momenton poste li ne sukcesis rezisti premon de ambaŭ flankoj kaj elfalis el la vico malantaŭen.

Ekĝemis mi, ekĝemis la aliaj vidante sian reprezentanton el-
vicigita. Dank' al Dio, iu konscia alkuris kun seĝo. Saltis sur
ĝin sinjoro H. S. kaj ni denove havis okazon fieri, ĉar kvankam nia
reprezentanto estis malantaŭ la vico, tamen li estis super ĉiuj.

Ne kapablis tion toleri la aliaj deputitoj. Ili ĵetis plenkoleran
rigardon al nia reprezentanto kaj unu post la alia saltis sur la seĝon.
Nur sinjoro A. R. restis malsupre pro manko eĉ de unu kvadrata mik-
rono de libera spaco sur la seĝo. Li kuris ĉirkaŭe senhelpa. Subite
li kaptis poŝtrancilon kaj komencis pasie segi la malantaŭan kruron
de la seĝo.

Diabloj scias, kiel ĉio finiĝus, se la fotografisto ne komunikus
intertempe, ke li jam pretas fotografi, sed sur la fotografaĵo videb-
liĝos nur la gamboj, ĉar la fotografatoj troviĝas ĉiuj tro supre.

Tiamaniere pro teknikaj kaŭzoj niaj deputitoj devis forlasi la
seĝon. Nur sinjoro H. S. --nia reprezentanto--ne volis salti sur la
teron, kvazaŭ li ŝanĝiĝus je monumento. La fotografisto ordonis al
ĉiuj resti senmove, poste li malkovris la objektivon, kovris ĝin kaj
per olimpika kvieto aldonis, ke li fortrancis la kapon de sinjoro
H. S.

Indigno ĵetis min supren je unu metro kaj kvin centimetroj. La
fotografaĵo estis fuŝita. Kiel mi montros tian memoraĵon al miaj
infanoj?! Ne miru, do, ke mi entute aprobis la fakton, ke nia deputito
prenis la seĝon kaj ĵetis ĝin sur la fotoaparaton, kiu sekve dispecigis
je papaveroj.

Per tiu ĉi--ni konfesu--forta akcento finiĝis la kongreso. Par-
donu: mi forgesis aldoni, ke antaŭ la finiĝo de la kongreso okazis
bankedo--kompreneble per la buŝoj de niaj reprezentantoj.

--el Kontakto

#

J E N

urges all its members
to attend the

ESPERANTO CONGRESS AND WORKSHOP

Washington, D. C.,

July 21-24, 1966

See page 22 for details!

NIA LANDA ASOCIO FORTIĜAS!

Humphrey/Tonkin

Por ke ĉiu ajn organizo floru, necesas subteno. En Usono la ĉefa batalanto en niaj klopodoj akceptigi Esperanton kaj informadi pri la lingvo estas la landa asocio, Esperanto-Ligo de Nordameriko (ELNA). ELNA nun havas sepcenton da membroj el ĉiuj partoj de la lando, kaj tiuj personoj formas la eliton, la plej aktivan kernon, de la usona esperantistaro. Tute nature, ELNA deziras ke ĉiu usona esperantisto fariĝu ELNA-ano, ĉar tiumaniere tutnacia agado fariĝos pli facila, pli efika kaj pli larĝa. Se vi ne estas ano de ELNA, petu informojn pri la organizo de la nova informoficejo kiun ELNA funkciigas en Novjorko--Esperanto Information Center, 156 Fifth Avenue, New York, N. Y. 10010.

E.I.C. pritraktas informpetojn pri Esperanto el la tuta Usono, eldonas la propran anglalingvan informilon, rilatas kun la gazetaro kaj aliaj novaĵmedioj, kaj ĝenerale kunordigas Esperanto-agadon ĉi-lande.

ELNA bezonas kaj meritas vian subtenon!

Sed estis epoko kiam ELNA ne tiel prosperas. Malmultaj homoj povus disputi ke antaŭ kelkaj jaroj la gejunuloj estis la ĉefa forto kiu rezultigis reorganizon kaj refortigon de ELNA, precipe per konstanta spronado kontraŭ la gvidantaro. Trafoliumante la redakcian materialon de la komenca periodo de JEN, mi trovis etan majstroverkon de nia tiama estrarano Jonathan Pool, kiu, kvankam skribite anglalingve, tamen meritas aperigon en nia bulteno--kiel historia dokumento. Ĝi titolas:

The ELNA Blues

Well, gather 'round me, members,
And listen to a tale
Of discombobulation that'll
Make you all turn pale.
It's the ELNA Blues!

Well, I remember that day five months ago:
I skipped breakfast, lunch and dinner just to scrape up the dough.
I slipped it in an envelope and sealed it tight,
I stuck on a stamp and addressed it just right.

I dropped it in a mailbox and sat down to wait--
And I been waiting to this very date.

:: I ain't got no receipt, I ain't got no Review,
I ain't got no ballot, nor a card to show you.
All I got is the ELNA Blues.

Well, four months ago, I wrote to Meadville, Pa;
I said I hope my member-card's on its way.
And three months ago I got a crazy reply:
The Secretary wrote to me, "Well a-my oh my!
Are you really sure that you sent your check?
Car mi ne trovas vian karton en la kartotek'."

I ain't got no receipt...ktp.

The Secretary continued thus:
"If you got any doubt about your standing with us,
Drop a little note to Futran, Berry and me.
Be sure to make a copy for the Pres. to see,
Also write to Helmuth tellin' just what you want,
And of course, send a carbon to Oakville, Ont."

I ain't got no receipt...ktp.

Well I wrote six letters on my typin' machine.
The postage bill raally broke me clean.
I told 'em all my problem, asked their pity on me,
And threatened to found a new landasoci'.
Well, holy moly, after just a week and a day,
Guess what the mailman brought my way?

I got six receipts, I got six Reviews,
I voted six times on the same dang dues,
And I've lost those ELNA Blues!

Do, miaj karaj, esploru jam nun la eblecon aliĝi al la nova
ELNA!

#

#

#

KIEL MI RENKONTIS STRANGAN HOMON IUN NOKTON
EN PARKO, KAJ KIO OKAZIS. . .

Pasintan someron mi feris en Londono. Ĉar mi estis tie proksimume kvar monatojn, mi havis multajn aventurojn--kaj estante naiva junulineto, mi bone memoras unu.

Sola, mi iris al subĉiela simfonia koncerto, en unu el la belaj parkoj kiuj ornamas la anglan ĉefurbon. Por atingi tion mi devis trafi subfervojn kaj aŭtobuson, kaj poste marŝi.

Mi atingis la lokon, kaj trovis seĝon. La nokto estis tre bela--varma, kaj agrabla. Je la fino de la programo, mi marŝis tra la parko por atingi aŭtobuson. Dum mi promenis, mi pensis pri la bela loko, la koncerto, la steloj...sed rimarkis ke kun mi ankaŭ marŝas alia persono, kiu, ŝajnas al mi, volas paroli al mi. Mi ne volis kun iu ajn paroli kaj rapide paŝis. Sed li ankaŭ rapidis, kaj finfine, li diris al mi, kun bela aplombo, "Ĉu vi ofte venas al la parko por aŭdi la muzikon?"

"Ne," mi murmuris, dum mi plirapidigis la paŝojn. Kion mi povas fari? Mi ne volas paroli kun stranga homo, mi eta usonanino en fremda lando.

"Sed," li diras, "ĉu vi ŝatis la muzikon?"

"Jes," mi respondis, kun ankoraŭa rapidiĝo.... (Sed li simple marŝas kun mi. Diable...kion fari?)

"De kie vi estas?"

"Usono"

(Kaj nun tute certe li komencos rakonti sian vivhistorion...)

"Mi rakontu pri mi mem..."


...(Kaj jen li komencas...)

Tiel, flue parolante pri aferoj tute neinteresaj al mi, la ulo akompanas min tra la parko. Tiel anuige antaŭvidebla estas lia konversacio. Mi rapidigas, timeme, la marŝadon. Mi timas, ĉar mi ne scias kial mi devas aŭskulti lin...li parolas pri desegnaĵoj en sia apartamento (jes, vere!)...li estas artisto..."Ĉu vi volas veni al mia apartamento, kaj vidi miajn desegnaĵojn?..."

"Ne, ne," mi diris, "mi ne volas veni kun vi -- mi devas trovi aŭtobuson -- estas malfrue, kaj mi devas iri hejmen..." Kaj subite aŭtobuso.

"Ho, aŭtobuso!--Ĝis!," kaj mi kuras.

"Haltu, haltu!" li krias, "Ĉu vi volas havi mian telefonnumeron?"



"Donu tiun leteron al
via patro. Mi klarigis
ke vi ne rajtas reveni
al la lernejo ĝis vi
tondigis viajn harojn."



(daŭrigo de p. 9)

"Diable--jes, jes" (kio ajn, por silentigi lin). Li staras tie, skribante. Sed homoj amasas ĉe la aŭtobuso: spaco mankas. Malgraŭ mia batalado mi ne sukcesas enŝoviĝi. "Diable," mi pensas. La aŭtobuso foriras.

"Ĉu vi volas trinki bieron kun mi ĉe la apuda trinkejo?"

--Ho, jen S-ro Korrompanto, denove--

Do, venkite, mi iras kun li. Ni aĉetas bieron, kaj komencas paroli--

"Ĉu vi estis jam en Eŭropo?" li demandas.

"Ne, sed mi esperas iri al Parizo."

"Eble mi povas iri kun vi." ... (Dio scias kion li volas...)

"Bedaŭrinde, NE." Li prenas skizlibron, montras al mi siajn desegnaĵojn...ĉiuj de mumeoj...kaj mi simple ne precize emocias pri mumeoj. Kaj li simple parolas kaj parolas kaj parolas (Kial vi ne simple fermu la kukotruon?)...

"Ĉu vi scias ke Keats loĝis ĉi tie," li komencas denove.

"Ne, mi ne scias."

"Jes, ĉu vi konas lian plej belan poemon?"

"Ne," mi diris.

Eraro. Li komencas deklami. Dio mia! Kio nun? Oscedo.

"Ne, mi ne havas la tempon..." mi diris, "Mi simple devas trovi aŭtobuson rapide, ĉar estas malfrue..."

"Mi marŝu kun vi al la haltejo." Li prenas mian manon (savu min!) kaj komencas deklami ankoraŭfoje. Marŝado. Frenezo. Marŝado. Deklamo. Marŝado. Deklamo keats biero aŭtobuso marŝado aŭtobuso.

"JEN AŬTOBUSO!"

Mi komencas kuri. Li kuras post mi. Mi saltas sur la aŭtobuson, kaj li krias, tristoplene, "Kiam mi revidos?"

"Mi telefonos..."

"...neniam," mi flustre aldonis, en la vakon de la ĉiam pli rapide preterpasanta nokto.

Julie Crandall

LA JUNULARO AKTIVAS

Novaĵoj el la tuta mondo liveritaj al nia redakcio de la Inform-servo de UEA-TEJO.

Informservoj Reorganizitaj

Rezulte de reorganizo de la Internacia Gazetara Servo de Universala Esperanto-Asocio, UEA kaj TEJO (ĝia junulara sekcio) kombinis siajn informservojn sub la egido de la IGS. Dum 1966 aperados regulaj bultenoj en la angla kaj franca lingvoj. UEA daŭre eldonos siajn proprajn bultenojn en Esperanto, kaj eble hispanlingva bulteno ankaŭ aldoniĝos.

Seminario por Junularaj Gvidantoj "Brile Sukcesa"

La unua seminario en la nova programo de TEJO por edukado de gvidantoj okazis en Hamburg, Germanio, en decembro. Temo de la seminario estis la rolo de TEJO en la ĝenerala Esperanto-movado. Partopreno en la seminario estis limigita al kelkaj reprezentantoj de la diversaj sekcioj de TEJO. JEN, ĝia nordamerika sekcio, ne povis reprezentiĝi. Partoprenis gvidantoj el Nederlando, Svedujo, Italujo, Francujo, Britujo, Aŭstrujo kaj Germanujo.

Pécs Kongresurbo en 1966

La urbo Pécs, Hungario, estos la kongresurbo de la 22-a Internacia Junulara Kongreso, de TEJO. La kongreso, la plej grava evento en la kalendaro de la junulara Esperanto-movado, kunigos kelkajn centojn da esperantistaj junuloj el 20-30 landoj. Partoprenos almenaŭ ses reprezentantoj de JEN. La programo inkluzivos kunvenojn kaj diskutgrupojn diversspecajn, kulturajn aranĝojn, ekskursojn, konkursojn (oratoran kaj sportajn), balon kaj, kompreneble, la ĉiujaran elekton de Miss Esperanto! La kongreso okazos de 23 ĝis 30 julio, la semajno tuj antaŭ la Universala Kongreso, en Budapest. Planu partopreni! Detalojn petu ĉe la redakcio de la JEN-Bulteno.

Nova Redaktoro por "Kontakto"

Juna, profesia ĵurnalisto Stefan Maul transprenis la redaktorecon de la junulara revuo "Kontakto", eldonita de TEJO. Maul, kiu transprenis la oficon de nia Humphrey Tonkin, estas redaktoro de germana katolika gazeto. Ni kaptas la okazon gratuli lin pro lia ĵusa edziĝo (kiel ankaŭ Carlo Minnaja, ĝenerala sekretario de TEJO,

kiu ankaŭ ĵus edziĝis). La revuon „Kontakto“ ricevas senpage junaj individuaj membroj de UEA en certaj kategorioj.

Tel Aviv Elektita por U. K. en 1967

Laŭ oficiala komuniko de la Estraro de la UEA, la Universala Kongreso de Esperanto okazos en 1967 en Tel Aviv, Israelo. La ĉi-jara U. K. okazos en Budapeŝto. En 1965 ĝi estis en Tokio. Ĝi jam usonanoj komencas fari planojn por partopreni en 1967. Ĉu ankaŭ vi?

Instruistoj de Esperanto Konferencos en Aŭstrujo

La Dua Konferenco de Lernejoj en kiuj Esperanto estas Instruata okazos en Graz, Aŭstrio, venontan julion. Partoprenos la gvidaj esperantistaj edukistoj, kaj prelegos tiufakaj eminentuloj (interalie JEN-ano Duncan Charters, el la universitato de Indiana, specialisto pri lingvaj instrumentoj). Datoj: 23-28 julio. Usonaj instruistoj, nepre partoprenu!

Internaciaj Seminario denove Sukcesa

La 9-a Internacia Seminario de la germana TEJO-sekcio okazis je Novjaro en Hamburg. Partoprenis reprezentantoj el 15 landoj, inkluzive Aŭstralio, Hindujo, Malio kaj Japanio. Temo de la seminario estis "Li kaj Ŝi: Gejunuloj en la Moderna Mondo.,

1200 Britaj Lernejoj lernas Esperanton

Laŭ la laŭdinda Jarraporto de la Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj, 1200 infanoj lernas Esperanton en britaj lernejoj. Statistikoj por Usono? Laŭ la usona esperantista instruista organizo ĝi verŝajne sumas maksimume 150! Kion ni povas fari por plibonigi tion?

Scienca Seminario Okazos en Pollando

Junaj sciencistoj, parolantoj de Esperanto, kunvenos en Pollando dum aprilo por partopreni la duan Sciencon Seminarion kiun organizos la Esperantista Studenta Scienca Rondo en la Universitato de Toruń. La seminario okazos sub aŭspicio de la Unio de Polaj Studentoj.

#

#

SIR JOHN HARRINGTON (1561-1612) estas plej bone konata al studentoj de literaturo kiel tradukanto de la ĉefverko de la itala poeto Ariosto. Estas simile bone konate (eĉ se apokrifite) ke li faris sian tradukon kiel punon. Laŭdire, li tradukis la plej maldecan parton de la verko por amuzo de la ĉambristinoj de Reĝino Elizabeth, sed la reĝino eltrovis tion kaj insistis ke li traduku la ceterajn 30,000 versojn! Malpli konate estas la fakto ke Harrington inventis la akvofluan necesojn, la tielnomatan W.C., kaj instalis la unuan tian inventaĵon en sian kamparan domegon apud Bath, en la graflando Somerset. Malgraŭ la vortludo, mi aldonus ke temis pri neniel superflua invento: ĝi kaŭzis revolucion en saneca inĝenierado. Baldaŭ tiuj akvumaj necesoj troviĝis en la palacoj de la Reĝino kaj poste (kiel ni bone scias) tra la tuta mondo. Sed la preokupiĝo de Harrington pri fekaj aferoj tute nature kaŭzis kritikan sintenon inter la malpli progresemaj korteganoj. Sekve, Harrington aperigis en 1596 The Metamorphosis of Ajax (tiel vortludante kun la tiam kutima nomo por fekejo) en kiu li defendis sian starpunkton per la plej altaj klasikaj precedentoj kaj donis detalajn instrukciojn pri la konstrumaniere de la aparato. Inkluzivigis ankaŭ kelkaj poemoj, inter ili tiu kiu aperas en traduko tie ĉi. La ilustraĵo estas el la unua eldono de la libro, kaj montras i.a. la Harrington-an necesojn. TRI BIRDOJ estas tradicia kanto, plej verŝajne el la 17-a jarcento, kaj estas inter tiuj kantataj de Ed McCurdy, sur la diskoj "The Best of Dalliance" (Elektra EKL-213).



Digna piulo sur
Farante kiel li
Kaj, laŭ kutimo
Tujuje alproks
Satano, kiu nom
Al Dio sendi pr
Kaj gracomanka
Ĉielen de ĉi ti
La pia hom' rig
Sed fine lin re
"Spirit' damnit
Despera pri vi
Al ĉiu laŭ meri
Al Di' la preĝ',
La puraj preĝoj
Dum ni al la in



TRI BIRDOJ

Tri birdoj nestis en iu florbed';
 Kriis unu kaj du, "Al ŝia pied'!"
 La tria eniris sen ĝen', sen ĝen',
 La tria eniris sen ĝen'.
 Ho brila borilo, facilo de spilo
 Kun tiel malmulte da martelad',
 Malmulte da martelad'.

Tri birdoj nestis en eta abi';
 Kriis unu kaj du, "Al ŝia tibi'!"
 La tria eniris sen ĝen', sen ĝen',
 La tria eniris sen ĝen'.
 Ho brila borilo, facilo de spilo
 Kun tiel malmulte da martelad',
 Malmulte da martelad'.

Tri birdoj nestis en pinarbotru';
 Kriis unu kaj du, "Al ŝia genu'!"
 La tria eniris sen ĝen', sen ĝen',
 La tria eniris sen ĝen'.
 Ho brila borilo, facilo de spilo
 Kun tiel malmulte da martelad',
 Malmulte da martelad'.

Tri birdoj nestis ĉe pinto de tur';
 Kriis unu kaj du, "Al ŝia femur'!"
 La tria eniris sen ĝen', sen ĝen',
 La tria eniris sen ĝen'.
 Ho brila borilo, facilo de spilo
 Kun tiel malmulte da martelad',
 Malmulte da martelad'.

Tri birdoj nestis en nest' el lanug';
 Kriis unu kaj du, "Al ŝia pug'!"
 La tria eniris sen ĝen', sen ĝen',
 La tria eniris sen ĝen'.
 Ho brila borilo, facilo de spilo
 Kun tiel malmulte da martelad',
 Malmulte da martelad'.

ujo sidis
 turo gvidis
 flustris preĝon.
 lian seĝon
 ion peko
 dum la feko,
 lia voko
 taŭga loko.
 s lin ĉagrene
 dis fidoplene:
 ka, homkonfuza,
 pri ni ĵaluza;
 senfortas tento):
 i la ekskremento.
 Jehov' ascendas,
 la fekon sendas.

BARBRA ALLEN (angla popolkanto)

Kreskigis la printempa maj'
la florojn ĉiujn belajn,
kaj Vilhelmo estis mortonta tuj
pro am' de Barbra Allen.

Serviston sian sendis li,
al ŝia urba hejm' lin,
dirantan, "Venu al mia sinjor'
se vi estas Barbra Allen."

Ŝi malrapide levis sin
kaj lante al li iris,
kaj-- "Sajnas, ke mortigās vi"--
al li nur tion diris.

Li turnis sin en la mola lit'
kaj la vizagon muren.
"Adiaŭ nun, amikoj vi;
bonfartu, Barbra Allen."

Post kiam enteriĝis li
ŝi aŭdis mortsonoron;
kaj ĉiu frap' aldiris ŝin:
"Kruela Barbra Allen."

"Ho panjo, fosu tombon por mi;
profunda kaj longa ĝi estu.
Vilhelmo mortis pro am' de mi,
kaj mortos mi pro tristo.

"Kaj paĉjo, fosu tombon por mi,
profundan kaj longan ambaŭ.
Vilhelmo mortis hieraŭ ja,
kaj mortos mi je morgaŭ."

Vilhelm' enteriĝis en kapel-
tombej',
kaj Barbra Allen apude;
kaj el lia kor' elkreskis roz',
kaj dorn' el ŝiaj piedoj.

Ĉe l'supro de la kapeltur'
haltiĝis ilia kreskado;
kaj tie ligiĝis la roz' kaj
dorn'
en bela amonodo.

-- tradukis Mark Mandel

(La MELODIO de la kanto tro-
viĝas en Joan Baez Songbook
kaj estas tiu kutime kantita
de Joan Baez.)

DISAJ PENSOJ PRI NEESPERANTISTAJ AKTIVECOJ

Mandragoro

(Notu de la redakcio: Kvankam severe konsciante la politikan neŭtralecon de nia gepatra organizo, TEJO, ni kredas ke la jena artikolo, pri kies enhavo ne respondecas la redakcio mem, havas valoron en la nunaj streĉaj cirkonstancoj - ĉefe ĉar ĝi prezentas kelkajn eble nekonatajn faktojn)

Ekster Usono la konfuzo pri la vjetnama politiko de la usona registaro estas proksimume same granda kiel la konfuzo en Usono mem. La usonanoj denove montris sin kontraŭkomunistaj kaj ne pro-demokratiaj, apogante la reĝimon de minoritato en la nomo de demokratio kaj en lando kiu neniam ĝuis demokration. Kontraste al la usona registaro, tiu de Johnson ankaŭ montris sin komplete mensoga. Aŭskultu nur nian amikon Rusk - aŭ komparu la elektajn paroladojn de Johnson kun la nunaj liaj paroladoj...

Mi prezentu kelkajn faktojn...

- *Usonaj surteraj unuoj kaj iliaj apogaj helikopteroj forpafas ĉiunomate 100 milionojn da dolaroj da kugloj. Tio signifas ke kostas ĝis \$35,000 por mortigi unu komuniston. (laŭ s-ro McNamara, raportita de U. S. News and World Report)
- *La tielnomataj "nemortigaj gasoj" uzataj de usonaj soldatoj en Vjetnamio jam forprenis la vivon de unu aŭstralia soldato, laŭ raporto de Sydney Morning-Herald (13 januaro). Konsiderante ke la gasoj estas direktataj kontraŭ la komunistoj kaj ne kontraŭ la aŭstralianoj, kiom da komunistoj estis mortigitaj de nemortigaj gasoj??
- *Laŭ s-ro Rusk, antaŭ la Senata Komitato pri Eksterlandaj Rilatoj, 28 januaro, 35 landoj helpas la usonanojn en Sudvjetnamio. Sed ili inkluzivas la Dominikanan Respublikon kiu liveras kelkajn tunojn de betono nur, kaj alian Latinamerikan landon kiu liveras kelkajn medikamentojn.
- *Raporto pri letero de Ho al Hindujo, en kiu li petis la hindojn uzi sian influon por fini la militon en Vjetnamio kaŭzis tujan negativan reason ĉe la borso en Novjorko...
- *La memoro de la usona elektantaro bedaŭrinde ne etendiĝas ĝis la kvardekaj jaroj, kiam certa Senatano Johnson aludis al "flavaj nanoj" en Senata debato pri Sudorienta Azio. Nun li fariĝis tiel kontraŭ-rasisma ke en lastatempa parolado li deklaris ke la usonanoj ne povas foriri de defendo de demokratio en Vjetnamio simple pro la haŭtkoloro

de la enloĝantoj. Brila bato kontraŭ rasismo?

* * *

El Norda Vjetnamio (pere de Pekino) komencis enflui Usonon nova bulteno, "Informilo", eldonita de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, organizo kun sidejo en Hanoi kiu estis fondita antaŭ deko da jaroj. La "Informilo" estas ankoraŭ unu pli-malpli senutila propagandaĵo, kun mirakle sengusta kanto pri tiuj kiuj sin mortigis per bruligo (unu el ili, parenteze, estis esperantisto) en Usono, kaj kelkaj aliaj "kulturaĵoj" - sen ia vere utila raporto pri la superflua milito. Kolektantoj de muzeaĵoj povas havigi la informilon de la organizo ĉe 68 Ly thuong kiêt, Hanoi, se ili povas elfantazii la metodon sendi leteron al Nordvjetnamio.

* * *


Spite la mankon de militdeklaro, poŝtaj servoj kun Nordvjetnamio el Usono ne plu ekzistas. Tiu fakto memorigas min ke Usono, sola el ĉiuj okcidentaj landoj (krom Hispanujo kaj Portugalio), ne permesas al siaj civitanoj vojaĝadon al certaj landoj kies ekziston la usonanoj ne agnoskas - nome Norda Vjetnamio, Kubo, Ĉinio, Albanio kaj Norda Koreo. La kialo, laŭ anoj de la registaro, estas la fakto ke Usono ne estas en pozicio diplomate ŝirmi siajn civitanojn okaze de iliaj vizitoj al tiuj landoj. Tamen, la vero estas tute klara: ili ne volas ke la usonanoj mem eksci pri la kondiĉoj en tiuj landoj. Aldona kuriozaĵo: necivitanoj de Usono kiu loĝas tie ĉi tute ne rajtas vojaĝi al iu ajn komunista lando sen la antaŭa specifa konsento de la Ŝtata Departemento! La regulo, datumite 1 dec. 1960, klare montras ke la ĉefa intereso de la registaro pri vojaĝado al komunistaj landoj ne estas ŝirmado de siaj civitanoj, sed malhelpo ke entute iu ajn enloĝanto de Usono vojaĝu al tiaj landoj.

* * *

Fina averto... "Nelojaleco al Usono" signifas "Nelojaleco al la usona tradicio de demokratia regado." Memoru tion.

#

Laŭdire, la Internacia Arta Teatro
prezentos dum la Universala Kongreso
en Budapeŝt novan teatraĵon, "It's
a Bird It's a Plane It's Zamenhof".



Ŝi

Mi vekigis eke
ŝajne pro la sunradi'
kiu ekbrilis tra fendet'
en la kurten'.

Mi levis min sur unu brakon
kaj konstatis mian amatinon
kuŝanton tie, pace, dolĉe dormante,
vizago sen ŝminkaj'.

Haŭtperfekton havas ŝi
kaj ŝia spir' dolĉe susuras,
kaj ŝiaj mamoj ritme movas
dum ŝi spiras.

Hareroj delikataj sur ŝiaj vangoj
kaj ŝultroj ore respegulas
sune; kaj dismontras helbrunan haŭton.
Ho ŝi en dorm' min posedas
kiel mi ŝin kaj veke kaj dorme.
Ni estas kunaj kiel unu.

NEFORMALAJ BABILAĴOJ

Vi povas imagi mian ĝojon kiam mi ricevis per aerpoŝto, inviton verki ion interesan kaj amuzan por la JEN-Bulteno. Mi tuj ekprenis mian plumon kaj verkis vere majstran artikolon pri la samsekaj inklinoj de pluraj tre malsekaj Britaj konatuloj Esperantistaj. Jes, karaj, mi diris samsekaj. 'Kio,' mi aŭdas vin preskaŭ honte flustri estas la signifo de "samseka'?" La respondo, karaj, estas simpla. Samsekemuloj estas samsekaj, t.e. ke ili estas same sekaj matene kiel vespere kaj eĉ pli sekaj kiam ili parolas al grego de siaj adorantoj en la diversaj kluboj. Mi donos ekzemplon al vi. Ni prenu la plurfoje-jaran kunsidon de la konsilantaro de la Brita Esperantista Asocio. Kie en la mondo kunvenas pli nekredebla, stulta, enuiga, kaj ridiga grupo de ko-fiadorantoj? Ko-fiadorantoj signifas ke ili preferas teon sed ĉiam laŭte krias ke Kofio estas pli mense saniga (Kofio parenteze, estas pra-Ida vorto kiu signifas Koko).

Jam vi konstatas ke kvankam majstra, ĝi apenaŭ taŭgas por JEN-Bulteno. De tempo al tempo tamen, mi havas etan senton de maltrankvilo kiam mi vizitas aliajn lokajn Esperantajn grupojn. Nur antaŭ du semajnoj mi vizitis grupon en Lesser Burlington - on - Thames kaj la prezidanto de la klubo varme bonvenigis min kaj preskaŭ puŝis min en seĝon tute meze de ĉiuj aliaj seĝoj - (estis nenia eskapo) mi iom afable kaj ĝentile brubruis ĉiun fojon kiam oni parolis al mi -(en kiu ajn lingvo Diablo scias!). Tiam mi trovis sur miaj genuoj enorman teleron da sandviĉoj kaj kukoj kaj absurdan tetaseton duonmalplenan je teo (aŭ io). Mi paciencie mastikis dum kolera argumento elrompis pri ĉu oni prononcas 'Sandwiches' 'Samŭiĝiz' aŭ 'Sijandŭiĉiz'. Fine ambaŭ flankoj ekkaptis duonon de mia kolumo - "Kiu estas pli bona laŭ vi?" ili elkraĉis....

Resaniĝinte, kaj ekhejmenironte mi konstatis ke mi estas la Sekretario, Kasisto, Vic-prezidanto, Varbsekretario, Protokolisto kaj venonta parolanto por la Klubu en Lesser Burlington. Ho, karaj, neniam vizitu fremdajn lokojn - malbono povas efiki junulon tiel!

Ĉu vi iam provis trovi edzinon en Esperantujo? Mi dubas ĉu estas eble, ŝajnas al mi ke mia tuta vivo estas foruziĝanta dum mi ĉasas knabinojn kiuj ne volas esti kaptitaj, kaj samtempe fuĝas de knabinoj kiuj ne scias kion signifas for*** ! (Aŭ eble ili

scias sed tamen ne volas - aŭ volas - aŭ ... Diable! Vi vidas kiel mi miksiĝas! Mi memoras tre interesan amaferon ĉe iu Kongreso kiam estis tiam tre laŭmode havi 'Lapenna is mightier than the sword' tatuita ĉirkaŭ la epigloto. Mi sidis sur razeno kaj legis la plej freŝan libron de Mulberry Boulder "Kac hav their uses" kiam tre bela blondulino plektis la brakojn ĉirkaŭ mia kolo kaj komencis mordeti mian orelon (Kio sekvas estas havebla de JEB librovenda fako poŝt-sendite en senindika koverto po nur\$5.

John Leslie, sekretario de BEA, speciale atentigas ke ĉi tiu tre bela libro ne estas havebla de BEA! Similan libron vi povas havi de William Bauld (Skotlando) je Teknikoloro.

Jam la redakcio de Kial Ne? ricevis tri leterojn kiuj informis ilin ke la sendintoj ne plu volas ricevi Kial Ne? pro la aĉa, obscena, malĉasta, dekadenca kaj pornografia enhavo. (Speciale ĉe 'Paĝo por Geinfanoj'). Ni ne tre ĝenas nin tamen, ĉar jam la legantaro saltis de 45 ĝis 250. Ĝis baldaŭ.

Skrubbington.

Por la informo de niaj legantoj:

"Skrubbington" estas la suĉnomo de Peter Kelton Groves, la Konata Sekretario de la Junularo Esperantista Brita, nia ekvivalento en Britujo. Kial Ne? estas la gazeto de JEB.

#

ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA invites you to its ESPERANTO CONGRESS AND WORKSHOP, July 21-24, 1966, planned in conjunction with the staff of the Center of Adult Education, University of Maryland. The Center is in a beautiful setting just 10 miles from the heart of Washington, D.C., and provides lodging at low rates as well as all the usual and many special conference services. Registration fee (\$15, students \$7.50) includes banquet and tour of Washington. The Center offers swimming, tennis, golf and other campus recreation facilities. The organizers' intention is that congress participants will become more fluent in Esperanto and more knowledgeable about it, with the added perspective of experts in linguistics, education and international relations. For details, write today to: Len Oliver, Conference Coordinator, Center of Adult Education, University of Maryland, College Park, Md. 20742.

GRAVA SCIIGO:: GRAVA SCIIGO:: GRAVA SCIIGO::GRAVA SCIIGO::GRAVA

LA ELEKTOJ DE J.E.N.

Kiel vi scias, ĉiun jaron ni elektas novan estraron de JEN. Nun denove venas la elekta sezono. La nuna estraro, kies nomoj troviĝas sur la interna kovrilpaĝo de la JEN-Bulteno, gvidis la organizon tra ĝia tria plena ekzistojaro, dum kiu JEN spertis, kaj plejparte venkis, novajn problemojn, kaj progresis al novaj atingoj.

La proceduro de la elekto estas klare indikita en la statuto de JEN. Unue la nuna estraro devas decidi pri la nombro de membroj kiun havos la venonta estraro. Per ĵus finita voĉdonado, la nuna estraro decidis ke la venonta estraro havos ses membrojn.

Tio signifas ke ni devas havi almenaŭ ses kandidatojn, kaj ni bezonas vin por liveri tiujn kandidatojn. Laŭ la reguloj, por ke ies nomo aperu sur la balotilo, la sekretario de JEN devas ricevi antaŭ la unua de majo proponon de lia kandidateco, subskribitan de almenaŭ du membroj de JEN.

Pro la malfrueco de ĉi tiu informo, ni akceptos proponojn ĝis la 15-a de majo. Ĉiu propono povas porti deklaron ĝis 100 vortojn longan favore al la kandidato. En la maja-junia numero de la JEN-Bulteno aperos la deklaroj por ĉiuj kandidatoj kaj balotilo por la voĉdonoj de la membroj.

Memoru ke nur membroj de JEN rajtas proponi kaj kandidatigi - sed ke ĉiuj membroj de JEN havas respondecon elekti la plej bonan kaj efikan estraron por gvidi la organizon tra la venonta jaro. Do, nepre faru ankaŭ vian kontribuon en ĉi tiu grava tasko.

Proponojn sendu al: Pat Shell, 2235 Parker, Berkeley, Calif.

LETEROJ AL LA REDAKCIO

(Noto de la redakcio: La Redaktoro ĉiam bonvenigas leterojn de la legantoj de la JEN-Bulteno, kaj aparte petas ke ili sentu sin invitatitaj skribi al li)

La Novembra-Decembra Numero

... Antaŭ nelonge mi ricevis la Novembran-Decembran numeron de la JEN-Bulteno, kaj mi tre ĝojis vidi, ke via organizo tiel fortigis, ke ĝi jam povas eldoni tiun bultenon. Sed kiam mi komencis legi ĝin, mia komenca ĝojo tre baldaŭ forflugis. Kun la escepto de kelkaj el la artikoloj, la enhavo estis - laŭ mia opinio - tro infaneca por interesi gejunulojn por Esperanto. Kvankam mi estas hodiaŭ eble unu el la plej maljunaj kaj plej malnovaj Esperantistoj en Usono, mi estis sufiĉe juna kiam mi ekinteresigis pri Esperanto kaj lernis ĝin. Estis antaŭ 42 jaroj, kaj mi estas tiam 19-jara.... Ni gejunuloj interesigis multe pri aferoj de paco, pri sociaj problemoj, pri naturo, pri la tuta mondo, pri sporto, pri muziko, pri multaj aferoj, kaj kiam amikoj vekis nian intereson ankaŭ pri la mondlingva problemo, ni ankaŭ tion inkluzivis en nian interesosferon. Se iu alproksimigus al ni kun (materialo kiel) la enhavo de la JEN-Bulteno, ni apenaŭ ekkaptus intereson por Esperanto. Se junulo fordonu valorajn horojn de sia malmulta libera tempo por lerni Esperanton, li devas scii kial li faru tion.

Ŝajnas al mi, ke la redaktantoj de la Bulteno tre malalte taksas la inteligentecon kaj idealecon de nia junularo, aŭ almenaŭ de tiu parto de la amerika junularo kiu potence iĝus Esperantistoj.

Alia kritiko mia koncernas la multajn lingvajn erarojn. La bulteno - laŭ mia opinio - havu edukan influon je ĝia legantaro kaj ideale kaj lingve; kaj tial estas necese, ke la lingvo estu kontrolita antaŭ la presado....

Karl Nell, Rochester, N. Y.

Mi devas skribi al vi pri la plej bona numero de la JEN-Bulteno kiun mi ricevis. Temas pri la novembra-decembra numero. Mi legis ĝin kun grandajplezuro kaj intereso, ĉar ĝi havas multajn artikolojn kiujn mi ŝatas. Ekzemple, la recepto por Su Tang Hon estas tre utila. Ĉu iuj personoj havas pli da receptoj por naciaj manĝaĵoj taŭgaj por publikigo en la Bulteno? Ankaŭ la artikolo pri la pensilvanaj germanoj kaptis mian intereson.

Penelope Pritchard, Barnstable, Mass.

Pri la terura lingva nivelo de la Muhlenberg-numero de JEN-Bulteno mi ne povas silenti: svarmas tiom da surprizaj eraroj, ke oni miras, kian lingvon oni parolas ĉe vi. Mi menciis nur la strangan uzon de 'kiel...tiel'; kaj kion signifas 'solveco', 'koneco', ktp? La enhavon, kvankam iom tro dispeca, mi trovis bona.

Brian Moon, Chigwell, Anglujo.

La redakcio respondas: La kuraĝa entrepreno de la studentoj ĉe la Kolegio Muhlenberg meritas ĉies laŭdon, sed ni aparte ĝojas ke la numero kaŭzis sufiĉan intereson inter miaj legantoj ke kelkaj ensendis utilajn komentojn kiujn ni certe priatentos en venonta agado. Kiu komentos la nunan numeron? Ekskribu!

#

FAKO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO POR VIA UTILIGO:
KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Adreso de la Koresponda Servo de U.E.A.: F-ino C. Hueter, 12, rue des Jacobins, 63-Clermont-Fd (PdD), Francujo.

Estas tre grave por la movado, ke ĉiuj esperantisto praktiku la lingvon almenaŭ perletere. Tial K.S.M. celas havigi al siaj membroj korespondantojn laŭeble konformajn al iliaj deziroj.--Ĉiuj korespondemulo rajtas senpage enskribiĝi sed ne ricevos rektan respondon, ĉar la Koresponda Servo disponas pri nenia financa subvencio. Ĉiu persono, kiu deziras rekte ricevi adreson de K.S.M. devos aldoni internacian respondkuponon (aŭ samvalorajn francajn poŝtmarkojn) por ĉiu petata korespondanto. (vidu ĉi-sube modelon de aliĝo al K.S.M.)

Konforme al la kunlaboro de UEA kaj Unesko, KSM celas starigi indan tutmondan korespondservon kaj tiu-cele invitas ĉiujn korespondemulojn al uzo de tiu speciala, kultura fako de UEA.--Ĉie en la mondo atendas vin amikeco! --

Modelo de Aliĝilo

Nomo kaj antaŭnomo: (bonvolu skribi preslitere)

Kompleta adreso: (bonvolu skribi preslitere)

aĝo: profesio:

Ĉu edz(in)iginta aŭ ne:

Deziras korespondi kun kiom da gekorespondantoj:

El kiu landoj:

Pri kiaj temoj:

La subskribint(in)o certigas respondon al ĉiuj korespondpetoj, transdonitaj de K.S.M. laŭ ĉi-supraj informoj.

...Nombro de enmetitaj respondkuponoj.

...Nombro de enmetitaj francaj poŝtmarĉoj.

Subskribo:

DEZIRAS KORESFONDI:

26-jara japana oficistino, kun usonanoj

- YOSHINO TANAKA, 4 Gomigaya, Tsurugashima, Iruma, Saitama, Japanio.

23-jara Brazila bankistino

- MALU V. COMIDE, Avda. Parana 158, Apt. 5, Belo Horizonte, Minas Gerais, Brazilo.

24-jara kuracistino

- S-ino EUGENIA NOGACZ, Nieskov 1, pta. Ziebice, Pollando.

27-jara medicinistino, laboras en hospitala laboratorio,

- D-rino IREN BENDE, Beke Sugarut 48, Gyula, Hungario.

23-jara franco, interesigas pri dancado, sportoj, filmoj,

- MICHEL GOUDEY, ĉe M. et Mme. Gillier, 12 impasse du Chene-Vert, Rue de la Chalouere, Angers, Maine-et-Loire, Francujo.

Knabino, 21-jara, oficistino, interesigas pri filmaktoroj ktp.,

- LUDMILA SEDAJOVA, Zambuk 59, Ĉeĥoslovakio.

(Ni volas substreki ke ĉiam la JEN-Bulteno publikigos korespondpetojn senkoste kaj senhezite. Tamen gravegas ke oni skribu preslitere aŭ per skribmaŝino, por ke oniaj nomo kaj adreso estu facile legeblaj)

#

#

#

PARTOPRENU LA KONGRESON DE T.E.J.O.!

--La tutmondaĵ gejunuloj esperantistaj kunvenos en Pécs (Hungarujo) de la 23-a ĝis la 30-a de Julio okaze de la 22-a Kongreso de TEJO.

La Loka Kongresa Komitato, fervore laboras por perfekte antaŭ-prepari la kongreson. Fondiĝis 15-membra Junulara Esperanto-Pantomingrupo, kiu kontribuos al la programo de la Belarta Vespero. En la tuta departemento ekestis esperanto-kursoj pro la jam sentebla spiro de la kongreso. Jes, dum la kongreso vi povos trovi gajajn amuziĝojn kaj seriozajn okupadojn, tute laŭ via placo. Unu afero estas certa: ne nur la junularo, sed la tuta gastama loĝantaro kaj la aŭtoritatuloj de Pécs kore invitas kaj atendas vin!

KOTIZOJ:

post la 1/4/66

Gejunuloj malpli ol 20-j.	23 US dolaroj
" 20j. kaj pli aĝaj	25 " "
Nemembroj de TEJO	27 " "

Tiuj sumoj inkluzivas la tutan restadon kaj programon. Informojn pri pagmetodoj kaj aliajn detalojn donas: TEJO Kongreso - PECS, pf. 114, Eungarujo, kaj la redakcio de la JEN-Bulteno.

#

M E M O R U !

Subskribu kaj subskribigu la peticion al U. N. Sendu subskribfoliojn al la usona peranto, Paul Stein, P. O. Box 10001, San Diego, Calif.

Aĉetu la JEN-Kantaron, po 10 cendoj, ĉe Stanley Cohen, 16 Long Avenue, Allston, Mass. 02134.

Informu nin pri via eventuala adresŝanĝo. Skribu al Stanley Cohen.

Aliĝu al UEA!

Juniaro Esperantista de Norda Ameriko
Stanley F. Cohen
16 Long Avenue
Allston, Mass. 02134

RPIUPM POSTAGE GUARANTEED